

Esperanto kaj Interlingua, 8-a parto

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 717, 1977.07.06 & 08 & 09

Parolas Claude Gacond. Laŭ la studo de Edo Bernasconi pri Esperanto aŭ Interlingua, kiu titolas ‘Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj’ kaj kiu aperis en la kolekto *Studoj* de Kultura Centro Esperantista, ni hodiaŭ alportas al vi kelkajn sciigojn pri la strukturo de Interlingua.

«Evidente la grafio de novlatinoida lingvo ne povas esti fonetika, kontraŭe, ĝi estas eĉ pli historia ol ekzemple tiu de la itala kaj de la hispana. La gramatiko de Interlingua estas relative simpla. Ĝi estas tipa simpligo de la novlatinaj gramatikoj kun 3 konjugacioj ‘am-a-r’, ‘hab-e-r’, ‘aud-i-r’, kelkaj neregulaj verboj ‘esser’, ‘haber’, kaj rigida sintakso pro manko de akordo inter adjektivo kaj substantivo.

Sed tie, kie Interlingua iĝas komplika, estas en la formado de novaj vortoj el/de jam konataj radikoj, pere de afiksoj - prefiksoj kaj sufiksoj.

- Unua malfacilo:

la radikoj povas transformiĝi. Tial, ni konsideru la radikon de la verbo teni ‘ten-e-r’: el ‘ten-’ originas: ‘io tene’ (mi tenas), ‘sus-ten-er’ (sub-teni), ktp.

Apude, ekzistas variantoj de tiu sama radiko, kiel ‘tent-’, el kiu originas ‘sus-tent-iv-e’ (subtena), ‘re-tent-ion’ (reteno); tin-, el kiu originas ‘abs-tin-er’ (forteni), ‘con-tin-er’ (kunteni).

Kiam oni uzas unu aŭ la alian bazan radikon? Tre simple: vi sekvu la uzon de la novlatinaj lingvoj!

- Dua malfacilo:

por unu sola funkcio, ekzistas amaso da finaĵoj. Jen kelkaj ekzemploj. Ni konsideru la jenajn substantivojn, kaj ni volu el ili fari adjektivojn. En Esperanto oni tutsimple kaj senescepte transformas la finaĵon -o al la finaĵo -a.

En Interlingua oni havas:

compensation – compensatori	= por kompenso – kompensa
illustration – illustrative	= por ilustro – ilustra
intention – intentional	= por intenco – intenca
reaction – reactionary	= por reakcio – reakcia
sedition – seditiose	= por ribelo – ribela

Inter la finaĵoj -ori, -ive, -al, -ari, -ose ekzistas neniuj senca diferenco: ilia funkcio estas ĉie la sama - adjektivigi substantivon.

Kiam uzi -ori, -ive, -al, -ari, -ose, ktp? Simple: konsultu la uzon de la novlatinaj lingvoj.»

Edo Bernasconi kalkulis, ke oni povas adjektivigi substantivon de Interlingua per 31 malsamaj sed samsignifaj sufiksoj!

«Koncerne la adjektivojn transformatajn al abstraktaj substantivoj ni imagu, ke germano volas lerni Interlinguan. En la germana ekzistas la sekvaj paroj:

wichtige – Wichtigkeit	= grava – graveco
aufmerksam – Aufmerksamkeit	= atenta – atenteco
richtig – Richtigkeit	= justa – justeco
brüderlich – Brüderlichkeit	= frata – frateco
dankbar – Dankbarkeit	= dankema – dankemeco aŭ dankemo

La germano ĉiam uzas en tiuj paroj la sufikson -keit, kiel ni povis aŭdi. Jen la samaj paroj en Interlingua:

importante – importantia
attentive – attention
juste – justessa
fraterne – fraternitate
grate – gratitude

Do, en Interlingua, por sama germana sufikso -keit kaj sama esperanta sufikso 'eco', estas uzataj 5 malsamaj : -ia, -ion, -essa, -itate, -itude.

Ekzistas unusola regulo por ilin korekte uzi: kontroli, kiel oni uzas ilin en novlatina lingvo. Malfeliĉa germano! Sed ankaŭ malfeliĉa slavo, japano, kaj, kial ne, franca laboristo, angla karbministo.»

Edo Bernasconi konkludas dirante:

«La afero povas aspekti sensenca, groteska eĉ. Tamen ĝi estas tute logika. Temas pri la racia konsekvenco de la akcepto de la bazaj eŭropo-centritaj principoj de la novlatinoida skolo. La sistemo de Interlingua ne estas, finfine, neracia: ĝi estas tutsimple la kvintesenco (kun ĉiuj malavantaĝoj) de la novlatinaj lingvosistemoj. Interlingua estas novlatina lingvo. Interesa filologia ludilo, kial ne, sed tute certe ne internacia lingvo.

La esperantistoj demandas sin, ĉu vere estas tiel malnature deziri lerni kaj utiligi lingvon racian, purigitan el ĉiuj strangaĵoj, malregulaĵoj, idiotismoj, kiuj beligas ja niajn naciajn lingvojn, sed kiuj certe ne estas bezonataj en niaj personaj kontaktoj kun eksterlandanoj.

Finfine, lingvo utiligebla estas lingvo, kiu faciligas al ni formi nian frazon, kaj tial lasas al ni pli da tempo por pensi al tio, kion ni volas diri.»

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !